

Enskribo

pri la 3a komitata kunveno okazinta la 26an de januaro 1954 en la klubejo en hotel Slovan. Komenco je la 22.15. Ĉeestis gesamideanoj Vondroušek, Friedrich, prof. Scheiber, Adamcová, Zitová, Borkovec kaj Kořínek. Post malfermo invitas s-ano Vondroušek s-anon Kořínek tralegi la koncepton de la sekretaria raporto por la jarkunveno okazonta la 2. II. 54. Post tralego fare de s-ano Kořínek la komitato sensanĝe aprobas la raporton. S-ano Borkovec faras koncizan raporton pri la stato de la kaso, pli detala raporto estos donita dum la jarkunveno. Poste estis kunmetita jena propono de la kandidat-listo por la novelekto de l' komitato: Josef Vondroušek, Josef Friedrich, Jiří Kořínek, prof. Vil. Scheiber, Marie Adamcová, Nelly Zitová, Drahomíra Chlubnová, Dro Inĝ. Jaromír Šikula, Jan Werner, Revizoroj: Miloslav Němec kaj Sáva Střelec.

Fine estis deciditaj kelkaj detalaĵoj pri la aranĝota balo.

Finite je la 22.⁵⁵.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la Komitata kunveno okazinta la 2.II.1954 en la klubejo en hotel Slovan post la jarkunveno. Komenco je 22a horo. Ĉeestis gesamideanoj: Vondroušek, Friedrich, Borkoves, Adamcová, Zitová, Chlubnová, Kořínek. En la jarkunveno estis elektita jena komitato (al kiu oni en la komitata kunveno atribuis sekvajn funkciojn): prezidanto s. Josef Vondroušek, vicprezidanto Josef Friedrich, kasisto Tomáš Borkovec, la sekretario Jiří Kořínek, lia sekretario Marie Adamcová, bibliotekistino Nelly Zitová, estrino de sekcio junulara Drahomíra Chlubnová, artprogramaj aferoj: prof. Vilibald Scheiber, komitatanoj: Dro Inĝ. Jaromír Šikula, Jan Werner. Kiel revizoroj estis elektitaj s. Miroslav Němec kaj Sáva Střelec. Post la divido de la funkcioj s-ino Adamcová raportis pri entreprenotaj paŝoj en intereso de nia maskobalo, nome, ke ŝi devos prizorgi aprobon koncerne la plialtiĝon de la pago de biletoj:

Finite je la 22.⁴⁰ h

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la 2a komitata kunveno okazinta la 7an de septembro 1954 je la 21.15 horo en hotelo Slovan. Ĉeestis ges. Vondroušek, Friedrich, Borkovec, Adamcová, prof. Scheiber, Zitová, Dro inĝ. Šikula, Kořínek kaj kiel gasto prof. T. Kilián el Třebíč. Post lego de la lasta enskribo raportas s-ano Vondroušek pri la traktadoj en la komitato de Kulturdomo (Dům osvěty), kien li estis invitita. S-ano Vondroušek raportas malkoncize pri sia 1½ hora pleda parolo por nia afero kaj pri amaso da argumentoj, kiujn li tie diris precipe kontraŭ la imputaj al ni farataj pri kosmopoliteco de nia movado. Ŝajnis, ke preskaŭ jam nia prezidanto sukcesis konvinki ĉiujn komitatanojn pri utileco de nia laboro, kaj paralizi la decidon eksigi nin el Domo de Kulturo. Tamen la ĉefa referento Dro Spilka fine akceptigis sian ripetatan proponon rekomendi al ni eksigon kaj aliĝon al Komitato de Pacdefendantoj, kie laŭdire estas por ni "plej taŭga agadkampo". Nia kluba komitato tamen trovas la agadkampon ĉe Pacdefendantoj tro malvasta kaj decidis plu intertrakti kun la kulturdomo, peti, ke oni nin refoje invitu al sekvanta komitata kunveno, kien ni sendus delegacion plurmembran (proponite s-anoj Vondroušek, Friedrich, Kilian, Šikula, Kořínek). S-ano Kilian promesas partopreni, se montriĝos necese, en la delegitaro.

S-ano prof. Scheiber nuligas sian artprogramon por 15a de decembro pro troa okupiteco kaj aliaj privataj motivoj. S-ano Dro Šikula proponas inviti "Soubor Javorina" el la Agrikultura altlernejo. Oni traktos pri tio, s-ano Dro Šikula prenas sur sin tiun komisionon.

S-ano Friedrich raportas pri favora rezultato de lia vizito ĉe gimnazia direktoro Nechuta en Kr. Pole. Libro el Esp. biblioteko postlasita de gymn. direktoro Karel Fridrich, kiuj troviĝos en la biblioteko de gimnazio de Kr. Pole, estas al ni promesitaj por favora aĉeto, sed ni devas atendi ĝis marto, ĉar oni rekonstruas la gimnazion kaj la kestoj estas deponitaj ie en nealirebla loko. S-ano Borkovec prezentas kasistan raporton, kiu vidigas, ke ni havas 1070,- Kčs bonhaston kontraŭ kelkaj pagendaj ŝuldoj.

S-ano Vondroušek atentigas pri la aranĝotaj E-kursoj, kiuj komenciĝos la 21an en Dům Osvěty en Rooseveltova str. 13 kaj li instigas ke oni konscie kaj favore varbu por tiu nova nia provo pri kursoj.

S-ano Adamcová proponas, ke la klubo pagu al s-ano Vondroušek vojaĝon al la Kongreso en Otrokovice 11.-12.IX. Ĉiesvoĉe akceptite.

La kunmeto de la programoj por venontaj 4 monatoj estis finita kaj preparita por presigo.

Finiĝis je la 22.45 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la 3a komitata kunveno okazinta la 26an X 1954 je la 22a horo en la klubejo en hotelo Slovan. Ĉeestis gesamideanoj Vondroušek, Borkovec, Friedrich, prof. Scheiber, Dro inĝ. Šikula, Werner, Adamcová, Kořínek. S-ano Vondroušek raportas pri la nova interveno ĉe Kultura Domo, kie ni sciigis ke la Komitato de Pacdefendantoj al ni ne konvenas pro ĝia malvasta agadkampo por nia laboro. Li legas tiurilatan leteron de s-ano Ambrož, kiu intervenis ĉe deputito Tymeš. K-ado Tymeš mem Esperanton konas, konsideras ĝin taŭga kaj principe konvena propagandilo precipe en okcidentaj landoj, kie la rusa lingvo ne estas disvastigita. S-ano Vondroušek ree refutas imputojn al ni faratajn pri kosmopoliteco de nia movado. Tamen eksigo fare de Kultur-domo estis al ni ripetita. Kun la komitato de K.D. traktos nova nia delegacio konsistanta laŭ proponoj jam lastfoje faritaj, el s-anoj Vondroušek, Friedrich, Kilian, Kořínek resp. Šikula.

S-ano Vondroušek raportas, ke al la nova kurso komencita sen afiŝado kaj gazetanoncoj aliĝis 33 partoprenantoj. Pro la misfavoro de nia tegmenta organizo Kultura Domo, dum 5 unuaj lecionoj devis la kurso kvarfoje ŝanĝi la kursejon. Instruas s-ano Vondroušek. Ŝajnas, ke definitive la kurso okazos en la Supera Ekonomia lernejo en strato Pionýrská. Kunvenejon por nia Junulara sekcio serĉis s-ano Kořínek kaj ŝajnas, ke plej konvena estos ejo ĉe la Uzina Klubo de Škoda uzinoj U Solnice. S-anoj Kořínek kaj Werner rigardos kaj ekzamenos kune la taŭgecon de la ejo morgaŭ. S-ano prof. Scheiber akceptis la komision kunmeti kaj estri la programon de la zamenhofa vespero la 14an de decembro. S-ano Dro inĝ. Šikula intertraktis kun la altlerneja ĥoro "Javornica", kiu promesis kanti ĉe la Zamenhof-vespero. La tradukotajn kantotekstojn transdonos s-ano Šikula venontmarte al s-ano Kořínek. La prezento de ensemblo Javornica okazu event. sen kostumoj, ĉar la kostoj estus troaj. Estis decidite al s-ano Dro Barviř, kiu jubileos sian 75an naskiĝdaton aĉeti donace vinon kaj bukedon; prizorgos gesamideanoj Adamcová kaj Scheiber. S-ano Vondroušek raportas, ke li proponis al Kultura Domo inviti s-anon Rudolf el Olomouc por prelego "Ekspedicio Kon-Tiki". S-ano Rudolf estas preta veni al Brno; pri lia prelego sed en Esperanto interesiĝas ankaŭ nia klubo por januaro. S-ano prezidanto instigas jam nun preparadi kaj baldaŭ anonci programojn por la sekvonta jartriono 1955. Bulteno estos pretigata kaj dissendita prefere antaŭ la teatraĵo "La lasta viro" kaj antaŭ la prelego de s-ano Dro Kamaryt, en la unua triono de novembro. Oni decidis aboni la Pacdefendanton kaj La Pacon por nia klubo. Estis akceptita propono disvendi Vortareton de Neologismoj dum la Zamenhof-vespero kun certa profito por kovri la elspezojn. S-ano Kořínek disponigos po 1 Kčs ekzempleron al la Klubo. S-ano Vondroušek skribis al Eŭropa Interpretisto enlistigi ankaŭ Esp. S-ano Borkovec anoncos Kasostaton: 529 Kčs sur

P.Ŝ.konto, 200 Kčs kontante. Finite je 23,30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

por la kvara komitata kunveno okazinta la 21an de decembro 1954 en la klubejo en hotelo Slovan. Ĉeestis s-anoj Vondroušek, Friedrich, prof. Scheiber, Borkovec, Werner, Dro Šikula, Zitová, Adamcová kaj Kořínek.

Post kiam tralegis s-ano Kořínek lastan enskribon, s-ano Vondroušek raportas, ke depost lasta komitata kunveno li sukcesis trovi kursejon en strato Pionýrská en la Supera ekonomia lernejo, kie la kurso bone prosperas. S-ano Kořínek fine trovis kunvenejon por la Junularo en la 8-jara mezlernejo sur Placo de la 28a de oktobro n-ro 22, kie dum du monatoj la junularo kontente kunvenadas. S-ano Borkovec raportas pri la kasa stato, kiu havas bonhavan nulan. Oni senprokraste preparos programojn kaj Bultenojn, por ke ili povu esti laŭeble ankaŭ antaŭ la Novjaro dissenditaj. S-ano Vondroušek dankas por la donacoj ricevataj okaze de lia kvindekjariĝo. Poste li legas la programon por la venonta jartriono. S-ano Werner sciigas, ke la junularo intencas kunvoki regionan junularan konferencon por la 20a II., kies partoprenantoj povus ĉeesti antaŭvesperon la maskobalon. S-ano Vondroušek atentigas, ke estas necese atentigi la klubanojn, ke oni mendadu trinkaĵojn, ĉar se ni ne havos kontentigan konsumon, povus enminaciĝi nia klubejo. Fine s-ano Vondroušek instigas veturi al la Regiona kunveno en Olomouc la 8.-9.I. Finite je la 23.¹⁰.

Enskribis Jiří Kořínek